Bob Dylon ,

# Kiom da mono elspezas la mond'

*tradukita de Joachim Gießner*

Kiom da mono elspezas la mond'
por bomboj, raketoj kaj mort'?
Multaj sin gloras, paradas per bus',
sufer' nek mildiĝas nek sort'.

Kiom okazu ankoraŭ mizer',
ĝis venos por savo la vort'.?
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da vojoj en tuta la mond'
abundas per larmoj, sufer'?
Kaj oceanoj ĝis mara profund'
plenplenas per trista mizer'!

Kiom da inoj dum tutsola viv'
atendas en vea toler'?
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
sopiras la ŝanĝon de l' stat'?
Kaj geinfanoj milionoj dum nokt'
ne dormas pro morda malsat'!

. . .

Kiom da homoj noktpetas en rev':
"Ho venu al ni bonas fat'!"
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de* BOB DYLON *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, ∗1941-05-24) en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-720-1449 (2012-12-11 09:50:59)*

*Troveblas tiu ĉi esperantigo de la kanto-teksto en* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf` *sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`*. Pri Joachim Gießner vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner`*.*